POR LERNI NOVAJN LINGVOJN NECESAS TEMPO KAJ FORTOSTREĈOJ.
SED ĈIU KAPABLAS FARI TION KAJ ĜI VALORAS LA PENON.

Mi ŝatas bonvenigi miajn gastojn dirante kelkajn vortojn en ilia gepatra lingvo.

Eĉ se temas nur pri kelkaj vortoj, vi estos pli afable bonvenigata dum viaj eksterlandaj ferioj aŭ laborvojaĝoj.

Kaj se vi estas persista, ĉiam novaj pordoj malfermiĝos antaŭ vi: vi renkontos novajn homojn kaj novajn pensmanierojn, eble pliboniĝos ankaŭ viaj laborperspektivoj. Krom tio vi spertos veran sukcesosenton.

Aldone Eŭropo estas bonega loko por lernado de lingvoj, ĉar ĉi tie multaj lingvaj komunumoj kaj kulturoj kunvivas proksime unu al la aliaj.

“

„MI NENIAM HAVIS EBLOJN LERNI LINGVOJN, KAJ NUN MI JAM ESTAS MALJUNA.”

Neniam ni estas tro maljunaj por lerni lingvojn. Oni ofte diras, ke nur infanoj kapablas rapide lerni lingvojn. Tio ne veras, ankaŭ plenkreskuloj ĝuas la lernadon kaj estas tre sukcesaj.

„DAŬRUS JAROJN POR LERNI ĈIUJN VORTOJN KAJ LA GRAMATIKON.”

Ne necesas ĉion lerni – vi povas ekkomuniki en fremda lingvo ankaŭ kun malmulte da konoj, eĉ se komence vi nur malmulte scias.

„MI ESTIS SENESPERA KAZO EN LA LINGVOJ KIAM MI FREKVENTIS LERNEJON.”

Multaj, kiuj ne studis bone en lernejoj, nur poste lernas lingvojn. La modernaj metodoj estas ĝueblaj kaj helpas komuniki kaj ĝui la lingvolernadon.

„MI EMBARASIĜAS KIAM MI FARAS MULTAJN ERAROJN.”

Ne embarasiĝu. La eraroj estas partoj de la lingvolernado kaj oni estos indulgemaj. Do, ne maltrankviliĝu, nur simple provu.

Plurmilionoj da ordinaraj homoj, kiel vi kaj mi, parolas fremdajn lingvojn, sed tre multaj pensas, ke ili ne kapablus je tio.

Li estis mirinda junulo. Mi volis skribi al li en la portugala, pro tio mi komencis lingvokurson.

„NUR LA ANGLA ESTAS BEZONATA NUNTEMPE”

La angla povas helpi nin, sed ĝi ne sufiĉas. Vi multe pli bone komprenos la homojn kaj tion, kio okazas ĉirkaŭ vi, se vi iom konas ilian lingvon.

”

„Mi ne scias kie komenci.”
Legu plu, kaj ni donos kelkajn bonajn konsilojn.

PRIPENSU KION VI VOLAS ATINGI

Ĉu vi volas

- lerni por kontentigi vin mem?
- kompreni alian kulturon?
- komuniki en via laborejo (telefonparoloj, kunsidoj, saluto de vizitantoj)?
- pli bonan postenon?
- paroli kun amikoj aŭ familianoj?
- elturniĝi dum mallonga vojaĝo en eksterlando?
- legi ĵurnalojn?
- lerni lingvon rete?

Antaŭ ol vi komencas

Ne forgesu, ke lernante novan lingvon vi lernas kompreni ankaŭ aliajn manierojn por pensi kaj fari aferojn.

Mi ŝatas retumi. Mi kapablas jam kaj en la hispana kaj en la angla legi. Mi akiras tiel multe pli da informoj.

PLANU TIEL LA LINGVOLERNADON KE ĜI KONFORMU AL VI KAJ AL VIA ĈIUTAGA VIVO. TIEL VI ESTOS PLI SUKCESA.

Starigu al vi la sekvajn demandojn:

- Kiom da tempo semajne vi povas dediĉi al la lingvolernado?
- Ĉu vi povas organizi por vi regulan lernoritmon?
- Kiujn helpilojn vi havas – kasedon, magnetofonon, komputilon, videoaparaton ktp.
- Kie vi povas atingi lernomaterialojn – biblioteko, librovendejo, eksterlandaj gazetoj kaj revuoj, retaj paĝoj, satelitaj programoj

KIEL KAJ KIE VI VOLAS LERNI?

• Rapide kaj intense	**aŭ**	dum pli longa tempo
• Kun amikoj / en grupo	**aŭ**	sola
• Aŭtodidakte / malĉeeste	**aŭ**	kun instruisto
• En via laborloko	**aŭ**	hejme
• En via propra lando	**aŭ**	eksterlande

KIUJN METODOJN KAJ MATERIALOJN VI OPINIAS TAŬGAJ POR VI? EKZEMPLE:

- Konversaciaj lecionoj kun cellingva instruisto
- Aŭskultado de sonmaterialoj dum vojaĝo
- Uzo de lernolibro
- Legado de magazinoj kaj ĵurnaloj
- Uzo de interreto
- Uzo de KD-ROM-oj
- Videomaterialoj
- Koncentriĝo je parolekzercoj
- Koncentriĝo je gramatikaj ekzercoj

Se vi jam havas spertojn en lingvolernado pripensu kiaj lernomanieroj pleje taŭgas por vi. Tio helpas vin elekti la por vi konvenajn kursojn kaj lernilojn.

Elektu vian lernomanieron

Lingvojn oni povas lerni multmaniere. La diversaj ebloj havas diversajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn kaj ili povas taŭgi al vi en diversaj situacioj.

Lernado en la propra lando

Engrupa

La studhoroj, okazantaj semajne unu-dufoje, proksime al via hejmo aŭ laborejo taŭgas por multaj personoj (sed kompreneble ne por ĉiuj):

- Engrupa lernado povas esti amuza
- Kun bona instruisto estas multaj ebloj por praktiki la lingvon
- Vi povas trovi amikojn kun kiuj vi povas lerni ankaŭ eksterlecione
- Ĝenerale estas fiksita horaro (sed samtempe estas ofte okazoj por lunĉpaŭze, vespere aŭ semajnfine lerni)

Vi povas trovi intensajn kaj specialajn kursojn, se vi tiajn bezonas.

Sola

Kun helpo de eldonaĵoj aŭ radio- kaj televidaj programoj, pretigitaj por memstaraj lernantoj

- La enhavon kaj la ritmon vi planas laŭ viaj bezonoj kaj celoj
- Ne estas fiksita horaro, vi lernas tiel kaj tiam, kiel kaj kiam vi volas
- Vi estas sola kaj devas motivi vin mem

Por kelkaj kursoj faritaj por memlernantoj oni disponigas tutoran helpon aŭ en formo de ĉeesto aŭ distancinstrue.

Ĉi-printempe ni partoprenis grekan lingvokurson. Post tio estis tute alia la somerumado.

Lernado eksterlande

Lingvokurso eksterlande

- Vi estas ĉirkaŭata de lingva medio kaj kulturo
- Vi kontaktiĝas kun lokuloj kaj povas sperti ilian vivmanieron
- Povas kosti multe
- Eble malfacilas trovi tempon por tio

Se vi vere klopodas, vi povas lerni eksterlande ankaŭ dum ferioj aŭ laborante en alia lando.

Virtuala lernado

Nuntempe estas pli kaj pli da ebloj uzante la interreton por kontaktiĝi kun aliaj homoj el diversaj partoj de la mondo.

.

Slovenio troviĝas ĝuste je la alia flanko de la landlimo kaj ni pli kaj pli ofte iras tien nuntempe, sekve, ni iom jam komprenas ankaŭ la lingvon.

Trovi kursojn

Informoj pri lingvolernejoj ĝenerale troveblas en la telefonlibroj.
Sed ekzistas multe pli da ebloj, kiuj kelkfoje estas malpli kostaj. En la plejmulto de la urbocentroj funkcias adoltklerigaj institucioj, kiuj ofertas ankaŭ lingvokursojn. Kelkaj lernejoj kaj universitatoj okazigas kelkhorajn kursojn semajne por la lokuloj. La lokaj aŭtoritatoj – informiĝu ĉe la urbodomo – kaj Komercaj Ĉambroj ofte okazigas kursojn por si mem aŭ almenaŭ scias kiuj faras tion.

Kelkfoje oni povas akiri utilajn informojn en la publikaj bibliotekoj. La klerigministrejoj kaj la regionaj edukinstancoj same povas helpi aŭ doni adresojn de tiuj fakaj asocioj kiuj povas doni konsilojn.

Vi povas lanĉi serĉojn ankaŭ en Interreto kun ŝlosilvortoj kiel „lingvokursoj” kaj la nomo de via loĝloko. Retkafejoj ofte disponigas malmultekostajn retalirojn por tio.

Tiuj, kiuj ne vivas en la proksimeco de bona lingvolernejo, aŭ kiuj preferus sola studi, ofte povas uzi la eblojn de distanclernado helpe de regiona adoltkleriga instituto, aŭ per universitato, aŭ (en kelkaj landoj) pere de la landaj edukservoj.

La plejmulto de la grandaj librobutikoj havas plurajn eldonaĵojn, kiuj taŭgas por memstara lernado.

La infanoj ĝuste nun komencis lerni en la lernejo la francan. Ankaŭ ni prenas lecionojn por ke ni povu helpi al ili en la hejmtaskoj.

Nia entrepreno faris vere bonan kontrakton; nia akceptisto parolas la rusan kaj tio multe helpis en la komencaj kontakoj.

Elekto de bona kurso

JEN KELKAJ BONAJ IDEOJ, PER KIUJ NI HELPAS VIN ELEKTI

- Petu ĉiam, ke oni vizitigu al vi la lernejon; aŭ se ĝi troviĝas eksterlande, akiru laŭeble plej multe da informoj ekzemple pri la loĝigo kaj sociaj aktivaĵoj
- Ĉu la lernejo donas klarajn informojn pri siaj programoj, grandeco de la grupoj kaj nivelo je kiu vi volas studi?
- Ĉu la teamo estas sufiĉe kvalifikita?
- Ĉu la lernejo havas bonajn materialojn kaj ilojn?
- Ĉu la lernejo estas aprobita de aŭtoritata instanco? Ĉu ĝi estas regule kontrolata de ekz. la kleriga ministrejo aŭ ekstera organizo?
- Ĉu ĝi povas prezenti referencojn de kontentaj studintoj?
- Ĉu ili kapablas prepari vin al ekzamenoj, se tio estas via celo?

Se vi jam komencis

Estas ĝuo lerni lingvon, sed se vi volas esti sukcesa, vi bezonas esti motivita. Ju pli vi estas aktiva, des pli vi estos sukcesa.

Se vi laciĝas aŭ sentas vin frustrita – la plimulto de homoj spertas tion kelkfoje – ne cedu. Priparolu vian problemon kun via instruisto aŭ iu kunstudanto. Faru iom da paŭzo – tio helpos vin kun nova energio rekomenci la lernadon.

Praktikaj konsiloj



- Ne provu ĉion je unu fojo ellerni. Starigu antaŭ vin klarajn kaj realajn celojn kaj antaŭeniru laŭ via propra ritmo.
- Estu malfermita al novaj lernomanieroj – novaj metodoj kaj novaj teĥnologioj povas helpi vin.
- Kaptu ĉiun okazon por paroli en la lingvo.
- Ne timu fari erarojn. Vi povas popaŝe labori pri tio, ke ili malmultiĝu. Gravas, ke vi komprenigu vin.
- Ripetu kion vi lernis kaj kontrolu vian progreson regule.

Legado kaj aŭskultado

- Tre gravas multe legi kaj aŭskulti multajn tekstojn. Ju pli vi aŭskultas des pli bone vi parolos. La legado helpas pli bone skribi.
- Legu kaj aŭskultu tekstojn, kie la teksto estas nature uzata (ĵurnaloj, televidilo, radio)
- Ne forgesu: vi ne bezonas ĉiujn lingverojn kompreni por kapti la esencon.
- Kontrolu vian progreson. Reiru al aferoj, kiujn vi jam prilaboris. Ĉu ili ŝajnas pli facilaj?

La instruistoj instruas,
sed nur la lernantoj povas lerni.
Fakte vi mem respondecas pri via progreso.

Skribado

- Serĉu okazojn por skribe komuniki - retmesaĝoj, salutkartoj, leteroj
- Tralegu kion vi skribis: dum skribado estas pli da tempo por kontroli kaj korekti viajn erarojn.

Parolado

- Praktiku la lingvon kiel multe vi povas (parolu al viaj kunlernantoj, al eksterlandanoj, kiujn vi renkontas, eĉ parolu al vi mem!)
- Kiam vi iras al lando, kie oni parolas la lingvon, kiun vi lernas, sed la homoj alparolas vin en via gepatra lingvo aŭ en la angla, klarigu al ili, ke vi preferas paroli en ilia lingvo.
- Parkerigu tiujn aferojn, kiujn vi plej ofte devas eldiri – esprimoj uzataj dum renkontiĝoj, aĉetumado ktp
- La plimulto de homoj neniam atingas, ke ilia prononco estu perfekta. Tio ne gravas, se oni komprenas vin.

Vortoj

- Estas pli facile lerni novajn vortojn, se vi grupigas ilin laŭ ilia signifo.

La plej bona maniero estas tiu, kiu por vi plej bone funkcias.